Sekr.: Inĝ.Jan Werner, Kroftova 84, BRNO 16, ĈSSR.

## Pri nia stato - necesas aktiviĝo

En la organo de ĈEA "Starto" n-ro 5/1969 mankas mencio pri nia faka sekcio. Nome pri ĝi validas la noto "...Pluaj sekcioj estos aprobitaj post transdono de necesaj materialoj."

Estas vero, ke post la marta /1969/ kunsido estraro de la sekcio ne eklaboris, rimarkebla estus nur individua agado de kelkaj membroj, sed la sekretario ne estas pri ĝi sufiĉe informita. En ĉiu organizo devas esti plej funkcianta persono la sekretario. En kazo de nia organizaĵo li stagnis, pro ĝenerala troa okupiteco, kaj li petas pardonon. Se estas iu el vi preta helpi al li en kelkaj necesaj aktivecoj sekretariaj, anoncu vin je lia supre menciita adreso. Forŝovi la aferon antaŭen la helpo estas urĝa!

Inĝ. P. Šťastný el Štětí, proponita por reprezenti la elektro-fakon en nia estraro, akceptis letere la kunlaboron, kvankam lia baza kvalifiko estas maŝina fako - varmo-tekniko - energetikaj ekipaĵoj.

Inĝ. A. Bednařík ekkontaktis kun s-ro Eichholz el Kanado kaj ricevis de li sliparan vortaron kun detalaj instrukcioj kaj presprovaĵan eldonon de Duden-Bildvortaro. Inĝ.Bednařík preparas rimarkigojn en nia komisio.

En plej proksima tempo la TS devas ordigi la organizajn aferojn rilate al ĈEA kaj ekde la jaro 1970 komenci deziratan celhavan laboron, pri kiu ni ĉiujn kunlaborantojn informados. Sed ne forgesu, ke ni atendas ankaŭ je via ago kaj informo pri ĝi. J.W.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

ESTRARO DE LA TEKNIKA SEKCIO DE ĈEA DEZIRAS AL ĈIUJ SIAJ KUNLABORANTOJ FELIĈAN KAJ PROSPERAN NOVAN JARON 1 9 7 0 !

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

## Kelkaj informoj pri la kunsido de teknikistoj en kadro de la konstitua kongreso de ĈEA en Brno la 30.3.1969.

La kunsidon ĉeestis 23 personoj. Malfermis ĝin Ak.ark. Jos. Drlík, ĝistiama vicprezidanto de la TS de ĈSEK, prezidis Inĝ. Vl. Kočvara. La ĉefan referaĵon faris Inĝ. Werner. Estis decidite aligi la ĉeĥan parton de la TS de ĈSEK al nove konstituita ĉeĥa Esperanto-Asocio. Estis elektita sekcia estraro: prezidanto Ark. J. Drlík, sekr. Inĝ. J. Werner, dokumentado Inĝ. Vl. Kočvara, lingvo Inĝ. A. Bednařík, kemia fako Inĝ. H. Landsperský kaj Inĝ.Z. Pluhař, maŝinfako Inĝ.L. Krajíc kaj F. Stoklasa, el.fako Inĝ. P. Šťastný, konstrufako Inĝ. J. Werner.

En la diskuto oni priparolis organizan strukturon, kunlaboron kun slovakaj gekolegoj, programon, terminologian laboron. Rilate programon de la sekcio oni konsentis kun la formulo laŭ la ĉefa referato. Ni publikigas fragmente:

"... Principe nia agado devas esti bazita je laboro de individuo. Kompilado aŭ tradukado de terminaroj, verkado aŭ tradukado de artikoloj, prelegoj. La faka laboro mem estos individua.

Tasko de la sekcio kiel organizaĵo estu, ke ĉiu aktiva kun-

laboranto, kapabla kaj kompleza labori, laboru laŭ koordino de la sekcio. Tio signifas, ke ni zorgos pri ĝenerala informiteco koncerne pretajn terminologiajn laborojn kaj fakajn verkojn en la internacia lingvo. Ni sekvos la evoluon de priteknika agado en la mondo, kontaktos kun ties gvidaj personoj kaj kontraktos partoprenon de niaj fakuloj.

Iom post iom prepari por nia enlanda publiko esperantista tradukojn de teknikaj terminaroj.

Duavice temas pri praktikado, artikoloj, simpozioj. Kaj denove estas necesa koordino. Verko de iu nia kolego ne havas por ni sencon en esperanto, krom la lingve ekzercan, kondiĉe, ke ĝi ne estas destinita precipe por eksterlando, al komercaj rondoj k.s. Sed ni klopodu pri individua kunlaboro kun eksterlandaj samfakuloj. Kiom pli valora estus tia serioza pritrakto de iu ajn teknika problemo, se apud si oni povus legi spertojn el pluraj landoj. Malperfektega funkciado de teknika kaj ekonomia informado en nia lando estas ideala medio por la skizita aplikado de la lingvo internacia.

Plua resumo en punktoj:

- Zorgi, ke en ĉiu fako ni havu unu aŭ pliajn faklingvajn specialistojn.
- Zorgi pri praktikado de la lingvo, sed laŭeble en plej vasta internacia skalo, precipe okupiĝi pri konkretaj teknikaj problemoj.
- Havigi al niaj kunlaborantoj unue lernan materialon, iom post iom ankaŭ literaturon. Prizorgi ĉiun priteknikan eldonaĵon eksterlandan kaj prepari nin por propra eldona agado.
- Registri ĉiujn teknikistojn esp. en la lando, inkluzive de la pasivaj, rekte ne kunlaborantaj.
- Daŭrigi en fondado de novaj fak-grupoj, zorgi, ke ĉiu faka grupo okupiĝu nur pri fakaj kaj fak-lingvaj aferoj.
- Evitadi tie administrajn temporabajn laborojn:
- Ĉiun administradon dume teni en la estraro, ne pro ia centrismo, sed pro liberigo de aktivaj laborantoj.
- Servi al publiko per tradukoj de fakaj tekstoj, ekz. de uzinaj prospektoj.
- Publici en gazetaro esperantista kaj nacia.
- Post organiza konsolidiĝo kontakti kun naciaj organizaĵoj de teknikistoj.

Mi finos per vortoj de nia karmemora D-ro Stanislav Kamarýt: "Evoluo de la homa pensado tendencas al ĉiam pli granda precizeco. Ankaŭ la lingvo havas la saman tendencon. Videbla signo de tiu tendenco estas modernaj klopodoj por lingva normigo. Ĝi signifas, ke la vortoj havu precize difinitan signifon. En unua vico temas pri terminoj teknikaj. Kaj ĉar tekniko estas pro sia esenco mem realaĵo internacia, nepre tia lingva normigo devas esti entreprenata en tutmonda skalo. Lingvo internacia estas por tio kondiĉo nepra..."

TEKNIKA SEKCIO ĉe Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko estas gvidata de Inĝ.Ivan Slavík, adr.: Nová Dubnica C-I-6/13.

INICIATINTO de "Nova laborplano por ordigi la evoluon de nia teknika kaj scienca lingvo" estas s-ro Rüdiger Eichholz, 2427 Padstow Cres., CLARKSON, Ontario, Kanado. - La interesiĝantoj pri la afero povas ricevi informojn pri la plano ĉe nia sekretario.

xoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxoxo